# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 08/12/2022 Sescentdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 684,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **151,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **141,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **93,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

**Viando kultivita en laboratorio**

2-a de decembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

**EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ DE LA "ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**N.ro 14 de "Por Komencantoj".**

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En "Dum la dek minutoj, dum kiuj li manĝis, la tuta torto malaperis":

A). Kio estas la ĉeffrazo kaj kio estas la subfrazo?

B), Unu vorto en la subfrazo reprezentas, signifas, ripetas alian vorton en la ĉeffrazo. La vorto en la subfrazo nomiĝas "rilata pronomo". La vorto en la ĉeffrazo nomiĝas la "antecedento". En la ĉisupra kombinita frazo, kio estas la antecedento kaj kio estas la rilata pronomo?

C). Kiu estas la gramatika objekto en la ĉeffrazo kaj kiu en la subfrazo?

2). En la frazo "Li ĉiam estis fidela amiko", kiuj vortoj estas gramatika objekto kaj kiuj vortoj estas adjektoj?
Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 612.

*Marcel Leereveld.* Sendita per peto de Marcel

# Marcel Leereveld, Gratulojn pro via 105a naskiĝtago

Marcel sendadis artikolojn al AE dum multegaj jaroj kaj pro tio la novaĵletero estigas tre valora tra la mondo kaj al la esperanto-mondo. Mi dankegas lin por lia helpo pli valorigi la novaĝleteron kaj Esperanto-lingvon mem *Roger Springer*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.
La 3a de decembro estis la unua sabato. Venis Roger, John, Rainer kaj aliaj

*Roger Springer*




Kara Roger,

ni, Martina kun Hanno, ni ĝuis multe nian renkontiĝon kun vi, John, Rainer kaj Michael en la bela loko Manly. Mi deziras al vi aliajn interesajn renkontiĝojn future.

*Martina Sachs-Bockelmann*





Famila foto 1937



Gepatroj de Marcel



Marcel 3 jaraĝa

Fotoj el la pasinteco de Marcel


# la lanĉo de nova poezi-libro

Dimanĉon, la 27-an de novembro, Jonathan Cooper parolis – en Esperanto kaj la angla – ĉe la lanĉo de nova poezi-libro, eldonita de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. La libro, *Rompitaj Labirintoj / Bung Mazes*, estis verkita en ambaŭ lingvoj, de la fama aŭstralia poeto kaj (relative) nova esperantisto, Kit Kelen. Ĝi havas specialan signifon en la verkaro de Kit, ĉar ĝi estas la unua libro, kiun li mem verkis en lingvo alia ol la angla. Trevor Steele donis detalajn konsilojn pri la Esperanta teksto, kaj la libro estis dezajnita kaj aranĝita de la profesia dezajnisto (kaj sekretario de AEA), Joanne Johns.

La parolado de Jonathan enkondukas Esperanton, kaj eksplikas kial ĝi aparte taŭgas por tiuj, kiuj interesiĝas pri la povo de lingvo.

La libro-lanĉo okazis en malgranda galerio en Glebe (apud Sidnejo) kie malfermiĝis ekspozicio de pentraĵoj, ankaŭ de Kit Kelen.

La poemaro kaj artekspozicio kunigas vortojn kaj bildojn, en abstrakta meditado pri la situacio de rifuĝintoj en la hodiaŭa mondo. "Rompitaj labirintoj" estas tio, kion la azilpetanto devas navigi por trovi novan hejmon en nekonata loko.




Kovrilo de la libro



Jonathan faras la lanĉ-paroladon Jonathan Cooper



Lanĉo-homamaso. Chris Betcher (estrarano de Esperanto NSW) kaj aliaj ĉe la lanĉo *Jonathan Cooper*

## La Melburna Esperanto klubo.

Hieraŭ ni festis la 105an naskiĝtagon de nia kara Marcel Leereveld. Multaj Esperantistoj, familianoj kaj amikoj ĝuis la belan tagon en lia ĝardeno en *South Belgrave.*



Ni gratulas lin pro lia longdaŭra laboro por nia bela lingvo kaj por lia amikeco kaj malavareco al ni ĉiuj. Vivu longe Marcel.

*Heather Heldzingen* por la Melburna Esperanto klubo.

# La Esperanto-Federacio de Viktorio

invitas vin al sia "Zamenhofa Festo"

7.00 ptm, Dimanĉon la 18an de Decembro 2022

ĉe la "Melbourne Unitarian Peace Memorial Church"

110 Grey Street, East Melbourne.

Ĝuu vesperon de muziko, kantoj, paroladoj, kaj aliaj distraĵoj

Bonvolu alporti pladon

Ni esperas ke vi celebros tiun feston kun ni.

★★★★

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). A). Ĉeffrazo: "Dum la dek minutoj la tuta torto malaperis".
Subfrazo: "dum kiuj li manĝis".
B). Antecedento: "(la dek) minutoj"; rilata pronomo: "kiuj".
C). Ne estas gramatika objekto en la ĉeffrazo nek en la subfrazo.

2). Ne estas gramatika objekto en ĉi tiu frazo. Adjekto = "ĉiam".

*Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** En la elsendo de la 5a de decembro 2022 vi aŭdos informojn pri la historio de la kvadrata ekvacio , spacteleskopoj kaj la malnova egipta lingvo .Vi ankaŭ retrovos famajn esperantistajn kantistojn



www.3ZZZ.com.au aŭ www.esperanto.com.au *Franciska Toubale*



Marcel 104 jaraĝa



Marcel 20 jaraĝa

Fotoj el la pasinteco de Marcel



Marcel kaj fratino Nora 1936



Edzino, Alida, dum 75 jaroj

# Bildoj el la naskiĝtaga festo de Marcel



